

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## 50 jarojn aĝas nia rondo

Ni nun nomas nin Ne-Profitocela Organizo Esperanto Jokohama, kaj tiel por 3 jaroj. Sed ni estas daŭrigantoj de Jokohama Esperanto-Rondo, establita en aprilo 1968, do ĝuste antaŭ 50 jaroj. Kvankam en Urbo Jokohama ekzistadis Esperantaj organizoj ekde 1906, la komenco de la organizita Esperanto-Movado en Japanio, fervoraj esperantistoj intencis fondi novan grupon en 1967, proveldonis organon ktp, kaj la oficiala fondo okazis en 1968. De tiam multaj aferoj okazis, sed ni insiste kreskigis la rondon.

(Sibayama Zyun'iti, la Prezidanto de la NPO Esperanto Jokohama)

## “Hamalogio” — daŭre prezentita — 3 prelegoj en marto —

Sibayama Zyun'iti

En la 17a de marto, en nia kutima kunveno, 16 personoj aŭskultis 3 esperantlingvajn prelegojn kadre de “Hamalogio” (t.e. studo pri Jokohamo). La prelegoj unuafoje okazis en la lasta novembro okaze de la 104a Japana Esperanto-Kongreso. Tiu ĉi okazo sekvas nian februaran kunsidon en kiu aliaj 3 prelegoj tiamaj estis ree prezentitaj.

### (1) “Pri la historio de lerneja tagmanĝo en Jokohamo” de Saguchi Yuko

La preleginto laboras en “Fondaĵo pri materialo de lunĉo servata en lernejoj en Jokohamo”, kaj okaze de la Japana Kongreso, donis esperantlingvajn subtekstojn al la samtema filmeto kaj prezentis tiun filmeton. Per la tiama materialo, ŝi faris prezenton. La prezento komenciĝis de la tempo post la Dua Mondomilito. Tiam militovenkita Japanio suferis de manko de manĝaĵoj, kaj helpis

japanajn lernejanon bonvolaj organizoj kiel LARA (Licensed Agencies for Relief in Asia, t.e. Licencita Instanco por Savo Azia). Iom post iom laŭ la tempopaso, nutrostato fariĝis bona: de 1949, pulvorigita lakto servata, de 1952 fritajo de balenaĵo, ktp. Multaj el la aŭskultantoj, jam ne tre junaj, retrovis en la bildoj de lunĉo sian junecon.

## (2) “Kotobuki-ĉoo aŭ simple ‘Kotobuki’ – la loĝkvartalo de simplaj tranoktejoj” de Tanigawa Hiroshi

En tiu kvartalo okazis la lastajara Japana Kongreso, kaj nuntempe jam iama ĝenerala impresoro de la kvartalo ne estas trovebla, sed Kotobuki-ĉoo estis unu el la tri grandaj loĝkvartaloj de simplaj tranoktejoj (aliaj en Tokio kaj Osako). Tia karakteriza trajto kreskis responde al la prospero de la haveno Jokohamo,

11 jarojn post la fino de la Dua Mondomilito, kiam japana ekonomio multe kreskis. En tia kvartalo, la preleginto mem servis kiel urba oficisto en bonfarta sekcio, kaj li memorigis pri kelkaj elstaraj personoj, kiuj sin dediĉis al la bono de tieaj loĝantoj.

## (3) “Historio de Esperanto-movado en Kanagavo” de Doi Ĉieko

Tiu ĉi prelego temas ne nur pri la urbo Jokohamo sed pri la gubernio Kanagavo (Kanagawa), en kiu situas Jokohamo. La preleginto verkis samtitolan japanlingvan libron la lastan jaron, kaj ĉi tie prezentis kelkajn epizodojn Esperante. Kanagavo estis lulilo de E-movado en Japanio per la unua E-organizo en

la urbo Jokosuka en 1906. La granda tertremo en Kanagavo, Tokio ktp. en 1923 multe malbonigis ankaŭ la movadan situacion, ktp. De 1973 ĝis 2000, nia rondo tenadis “Ĉambron” en Kami-Oooka, kaj la preleginto raportis, ke tiama konstruaĵo jam ne estas kaj nun troviĝas domo-komplekso tie.

---



---

## Eseo

---



---

### Tri Mini-montoj “Fuĵizuka” en Norda Jokohamo

AKIYA Hideo

La unuaj tri tagoj de la novjaro estis tre helaj ĉi-jare. Neniom da nuboj aperis en la ĉielo. Senventa, iom varmeta vetero logis min iri eksteren. Antaŭtagmeze de la tago dua, mi vizitis la lokojn en Kvartalo Tuzuki, norda parto de Jokohamo, kie troviĝas specialaj belvidejoj, “fuĵizuka.”

Kio estas la *fuĵizuka*? Tio estas miniatura, pseŭda monto, aŭ altaĵo de teramaso artefarita imitite al la formo de la Monto Fuĵi. De la malnova tempo en Japanio disvastiĝis ia kredo je montoj, kaj unu el la tipaj ekzemploj estas tiu je la “Monto Fuĵi.” Kredantoj rigardis kaj preĝis al la monto kiel dio, kaj iuj el ili eĉ grimpis sur la monton. Sed ne ĉiam ili povis vidi ĝin kaj ne ĉiuj povis plenumi grimpadon.

Oni diras, ke eble por solvi tian problemon, ĉirkaŭ ekde la 18a jarcento, multaj mini-montoj, fuĵizuka, estis konstruitaj precipe en la regiono de Kanto (Tokio kaj ĉirkaŭaj gubernioj). Ĉi tie

en Jokohamo ankoraŭ nun restas kelkaj mini-montoj. Ĉi-foje mi grimpis tri el ili, kiuj situas apud la municipa metroo “Verda Linio.” Ili estas “Yamada-fuĵi” (山田富士), “Ikonobe-fuĵi” (池辺富士), kaj “Kawawa-fuĵi” (川和富士).

Yamada-fuĵi, 8 m alta de piedo kaj 41 m super marnivelo, troviĝas en la parko nomata



“Yamada-fuĵi parko” najbare de la metrostacio “Kita-yamada.” Ĝia bela konusa korpo aspektas certe simila al la Monto Fuĵi. La pasejo al la montosupro estas rekta sur tre kruta deklivo. Sur la supro ŝtupŝtonoj estas vicigitaj laŭ cirkonferenco, kiuj kvazaŭ formas randon de brulilo. Mi ĝuis panoramon de 360 gradoj desur la supro. Poste mi descendis per alia malkruta helikforma pasejo, kiu ĉirkaŭas montoflankon, ĉar mi timis gliti kaj fali pro la kruteco de la deklivo.

Ikonobe-fuĵi, 8 m alta, 63 m super marnivelo, lokiĝas en la kamparo, ĉirkaŭ 10 minutojn piede de la metrostacio “Tuzuki Hureaino-oka.” Ĉar ĝia kapo estas kovrita de arboj, oni ne povas vidi ĝian supron klare de la irejo apud la kampo. Ĉe la eniro de suprenirvojo ekzistas toriĵo, sankteja simbolo, kiu rememorigas min, ke ĉi tiu ejo estas por kredo. Ankaŭ sur la montopinto troviĝas malgranda adorejo el ŝtono. Ĉi tiu mini-monto plej konvenas al la “fujizuka,” mi pensis.



Kawawa-fuĵi, 14 m alta, 74 m super marnivelo, estas la plej alta el la tri mini-montoj. Ĝi situas en la parko nomata “Kawawa-fuĵi parko.” Tien mi paŝadis ĉirkaŭ 20 minutojn de Ikonobe-fuĵi. Ĉar nur velkintaj herboj kovras ĝian flankon, la konusa korpo kun vasta piedo estas tute videbla. Dank’ al ĝia alteco kaj klara ĉielo de vintro, mi povis ĝui la plej belegan vidon desur la montosupro. Neĝa kapo de la Monto Fuĵi brilis super la montaro de “Tanzawa”, kaj dekstre alia roka monto kun neĝo apenaŭ vidiĝis. Laŭ la gvidtabulo sur la montosupro, la lasta monto estas eble “Ŝiomi-dake”fora en la Japanaj Sudaj Alpoj.



Oni diras ke japanoj preferas vidon de Monto Fuĵi kiel la unuan sonĝon de novjaro, kiu alportas feliĉon en la jaro. Bonŝance anstataŭ sonĝo mi povis vidi realan Monton Fuĵi tri-foje desur tri mini-montoj. Donu al mi grandegan, se eblus, trioblan feliĉon!

(vera Monto Fuĵi, 3776 m alta)



## Niaj Planoj

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

\*apr. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero: Pri Portugalio, la lando de UK – diversaj aferoj pri la historio, turismo, lingvo ktp.

\*maj. 1 - 7 [Galerio Minatomirai]: En galerio urbocentra, vasta je 81 kvadrataj metroj, ni ekspozicios pri Esperanto.

\*maj. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero: japanlingva prelego de socimovadisto, s-ro Nomoto Sankichi, simpatianto de nia lingvo. Li parolos kion li atendas de Esperanto.

---

---

## La 110a Legokunsido

---

---

En la 3a de marto ni havis la 110an legokunsidon por "La viro el la pasinteco" de Julian Modest. Partoprenis kvar personoj.

### Tragikomedioj ankaŭ nialande – "La viro el la pasinteco"–

Sibayama Zyun'iti

Temas pri libro kun 23 noveloj en 101 paĝoj, de bulgara aŭtoro Julian Modest. Unu el la noveloj scenas en Budapeŝto en Hungario, sed temas pri bulgara junulo. Fakte la aŭtoro pasigis plurajn jarojn tie kaj edziĝis al hungarino, laŭ la postskriba komento. Sed preskaŭ ĉiu novelo scenas ie en Bulgario, ĉu urbe ĉu kampare. La lego-impreso estas, ke preskaŭ ĉiu epizodo povas okazi nialande en Japanio, se la lokonomoj kaj personnomoj estus japanigitaj; ekzemple Mina estus japane Mina kaj Nora estus japane Noriko. En multaj epizodoj aperas situacio de 'divorco'; ĉu la ĉefrolul(in)o eksedz(in)iĝis, ĉu ties gepatroj apartiĝis, ĉu ties fil(in)o eksedz(in)iĝis. Tial la tono de la libro ne estas hela, sed griza, sed la ĉefrolul(in)o en rezignacio akceptas vivon tian. Tiel, la tragikomedijaj epizodoj estas proksimaj al ni.

Jen aparte pri kelkaj noveloj.

En "La viro el la pasinteco", gepatroj divorcis, kaj filo plenaĝa serĉas la patron en montara vilaĝo en Rodopo. Ne la rakontfadeno, sed la sceno alvokis al mi memoron pri mia iama vojaĝo al Bulgario, precize dirite al la esperanta staĝejo en Pisanica en Rodopo, kien mi kaj mia edzino vizitis per buso el Smoljan. Cetere, je nia vizito, Bulgario estis komunisma ŝtato, sed tiu ĉi novelo aŭ aliaj okazas en libermerkata socio, kiel nun estas. Fakte, ĉiuj noveloj en la libro datis el la jaroj inter 2012 kaj 2014.

"La Iluziisto" estas la plej impresita novelo en tiu ĉi libro. Iluziisto eks-cirka, divorcinta, montras sian iluziistan arton, aperigi ion ŝajne perditan, en montara stacidomo, kiam trajno ial devis resti longe tie. Tiam knabo petas lin aperigi sian panjon foririntan, kredante ke la iluziisto vere kapablas aperigi la panjon. Eta rimarkigo: se oni transskribus la novelon kiel japanan aferon; la ĉefrolulo juna forlasas lernejon jam en "septembro", sed en la japana novelo, tio devus okazi jam en "aprilo":

Septembro estas la komenca monato de lernojaro bulgara, kio estas aprilo en Japanio.

### "La viro el la pasinteco" de Julian Modest Oportunaj legaĵoj por ĉiuj

Mizro Iwaya

La aŭtoro jam publikigis kelkajn titolojn. Preskaŭ ĉiam lia libro havas ĉirkaŭ 100 paĝojn kaj estas dividita en pli ol 20 noveletojn. Do ni vidas ke lia verko estas tre oportuna por ni ĉiuj: de komencantoj ĝis veteranoj. Mi scias ke korea samideano Lee Junkee tradukis ĝin en la korean kaj publikigis ĝin kun esperanta originalo. Ĝi certe utilos kiel lernolibro de Esperanto. Por mi, nekorea esperantisto, ĝi utilas por lerni korean lingvon inverse.

La enestaj noveloj estas variaj. Do mi volas citi kelkajn el ili, kaj komenti respektive pri la enhavo.

"La viro el la pasinteco", la titolpaĝa verko, simbolas emeritecon. La ĉefrolulo havas glorajn karierojn. Sed li perdis ilin unu post la alia, kaj post divorco retiriĝis el la mondo kaj vivis trankvile en la monto kvazaŭ li vivus en pasinteco. Ja tio estas unu el elekteblaj vojoj kaj ne estas malfeliĉo.

"Ilona" estas rakonto perdi ĉion kaj vagi en Budapeŝto. Ĝi montras al mi karan rememoron pri mia vizito al Budapeŝto kaj ankaŭ pri mia sperto perdiĝi en la urbo Seulo, kie ĝentila junulino helpis min. La enhavo estas tragedia, sed la tono estas romantika kaj ĝoja.

"La iluziisto" aspektas al mi kvazaŭ mallongigita romano. Knabo estis sorĉita de cirka spektaĵo kaj mem membriĝis al la trupo. Ĝi nature vojaĝas turnee, kaj li mem lernas kaj spertas variajn prezentaĵojn. Ne mankas ankaŭ frapfinaĵo, ke de li sorĉita infano petis ne realigeblan revon.

Tiamaniere daŭras epizodoj. Ĉarma kaj ĝuinda libro.